

29a jarkolekto - junio 2008/06

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X

Vizo-vico

**Koro,
kiu neniam
serbe batis**

**Kaptukoj – kaj
kapdoloroj**



La plej nova novelaro de Lena Karpunina

Neokazinta amo

kun 15 novaj rakontoj, inter kiuj kelkaj estis premiitaj.



Legintoj skribas:

“Se mi estus leginta nur unu rakonton de Lena Karpunina, mi povus konvinke aserti: la juna verkistino estas vere talenta. En stilo klara, laŭ bona tradicio de la rusa literaturo, la rakontoj pliriĉigas niajn mensojn, plibonigas niajn korojn.”



(Ignat Florian Bociort)

“Ŝia majstra talento verkista konsistas ĉefe el homa psikologio kaj kapablo prezenti eĉ la plej strangajn personojn tiel, ke la leganto akceptas kaj eĉ ekŝatas ilin. En la Esperanta literaturo tiu ŝia talento estas vere malofta.”



(Sten Johansson)

Prezo: 15 eŭroj + afranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via kutima vendanto.

- ISBN: 90-77066-28-7
- Paĝoj: 150
- Serio Stafeto n-ro: 31

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Kaptukoj – kaj kapdoloroj

11

Kvankam la leĝoj malpermesas vestaĵojn, emblemojn aŭ aliajn simbolojn, kiuj povus damaĝi neŭtralecon, ili eksplicite permesas simbolojn konformajn al kristana kaj humana okcidenta tradicio. Tiel oni argumentis antaŭ jardekoj favore al la tiel nomata kutimjuro.



Litovoj ŝatas bele vestiĝi

14

Evidentiĝis, ke en la elspezorbo de averaĝa litovo vestaĵoj kaj ŝuoj okupas pli solidan lokon, ol en tiu de averaĝaeŭropano. Kvankam la elspezatasumo estas nur duono, litovoj bele vestiĝi kaj tiucele elspezadi emas ne malpli ol pli bone enspezantaj malnovaj EU-anoj. Perlaborinte pli, ili ankaŭ pli elspezas.



Kio estas spiriteco?

16

Mi akceptas la inviton de la redakcio al diskuto de la demando pri la spiriteco (Monato 2007/6, p. 18). La diskuto ja necesas, ĉar la nocio „spiriteco” estas perceptata diverse.



Vatikana biblioteko

18

Apud la papiruso Bodmer kutime estas multe admirata kaj apreziata la Codex Vaticanus (Vatikana Kodekso), kiu estas unu el la plej antikvaj manskribitaj kodeksoj (el la 4a jarcento) kun preskaŭ la tuta malnova testamento kaj kun granda parto de la nova, greke skribita sur pergamento en uncialaj (majuskulaj) literoj.

politiko

OPINIO	8
Koro, kiu neniam serbe batis	
NATO	9
Sukcesas du el tri	
UKRAINIO	9
Ukrainaj urbestroj	

moderna vivo

ALBANIO	10
Tragedio en Gerdec	
AKCIOJ	10
Profitas eksterlandanoj	
HOMAJ RAJTOJ	11
Kaptukoj – kaj kapdoloroj	
AVIADO	12
Forflugu la malbonaj ciferoj	
SKULPTAĴO	12
Masoĥisme monumente	
ALBANIO	13
Postfesta tragedio	
UKRAINIO	13
Vizo-vico	

ekonomio

LITOVIO	14
Litovoj ŝatas bele vestiĝi	
EUROPA UNIO	15
Rivalaj gastuboj	

spirita vivo

DISKUTO	16
Kio estas spiriteco?	
KULTURO	18
Vatikana biblioteko	

lingvo

LINGVO KAJ BELETRO	19
Rezulto de preseraro	

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7
› Anoncetoj	23

kiel pagi vian abonon de monato?

► Rekto al la eldonejo ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto	MONATO			LA JARO aere		
	surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso	
Argentino	EUR	23	27	13,8	5	9
Aŭstralio	AUD	82	90	49,2	9	17
Aŭstrio	EUR	49	53	27,6	5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5	9
Brazilo	EUR	23	27	13,8	5	9
Britio	GBP	34	37	20,4	4	6,5
Bulgario	EUR	25	29	15	5	9
Ĉeĥio	EUR	33	37	19,8	5	9
Danio	DKK	365	395	219	40	70
Estonio	EUR	25	29	15	5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (or.)	EUR	45	49	27	5	9
Grekio	EUR	45	49	27	5	9
Hispanio	EUR	45	49	27	5	9
Honkongo	EUR	41	45	24,6	5	9
Hungario	EUR	25	29	15	5	9
Irlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5	9
Israelo	EUR	41	45	24,6	5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5	9
Japanio	JPY	7900	8500	4740	860	1460
Kanado	CAD	73	78	43,8	9	15
Kipro	EUR	33	37	19,8	5	9
Koreio	EUR	41	45	24,6	5	9
Kostariko	EUR	23	27	13,8	5	9
Kroatio	EUR	25	29	15	5	9
Latvio	EUR	25	29	15	5	9
Litovio	EUR	25	29	15	5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5	9
Malto	EUR	33	37	19,8	5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Norvegio	NOK	390	430	234	45	71
Nov-Zelando	NZD	95	103	57	10	18
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22	36
Portugalia	EUR	41	45	24,6	5	9
Rusio	EUR	23	27	13,8	5	9
Singapuro	EUR	41	45	24,6	5	9
Slovakio	EUR	25	29	15	5	9
Slovenio	EUR	33	37	19,8	5	9
Sud-Afriko	EUR	41	45	24,6	5	9
Svedio	SEK	460	495	276	49	84
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	15
Tajvano	EUR	41	45	24,6	5	9
Usono	USD	69	75	41,4	8	13
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5	9

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libro servo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libro servo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijk 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Brazila:** Brazil Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoicejo@esperanto.fi.
- > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
 - > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 - > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - > Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalin.net.
- > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakatsu. 1/3 III. 1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- > **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O. Kesto 17765-184, Tehran.
- > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: novi-resp@eircom.net.
- > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.

- > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca.
- > **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr.
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gd-dewar@ihug.co.nz.
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Ruslandaj:**
 - > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-grad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zeiric@eunet.yu.
 - > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- > **Svedaj:**
 - > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 - > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org.



Pri paeljoj kaj pentraĵoj

Eble vi tion ne tuj rimarkis, sed tiu ĉi numero de MONATO estas enpaĝigita ne de nia multjara grafikisto Joan-Ferriol Masip i Bonet, sed de nova stabanino Julia Litvinova. Joan-Ferriol transprenis la grafikan aranĝon en 2005 de Hugo Fontyn, kaj nun estas lia vico por pludoni la stafeton. Kial? Ne ĉar li ne ŝatas la laboron, tute ne. Li forlasas nin malgaje, sed novaj horizontoj atendas lin. Joan-Ferriol (Farri por la amikoj) decidis krei valencian tavernon, kie oni povos trinki kaj gustumi specialaĵojn el la valencia lando, fama i.a. pro la tradicia paeljo! La

taverno krome estos teatro konstante proponanta folk-balojn, koncertojn kaj muzikajn atelierojn. Se iam vi vizi-
tos Barcelonon, serĉu ĝin en la kvartalo Gràcia, eksa urbeto, kie vespera kultura kaj libertempa vivo furoras!

Anstataŭos lin do Julia Litvinova (27-jara), kiu naskiĝis en Moskvo. Ŝi tie finis la universitaton kun specialiĝo pri germana filologio. Ŝi loĝas en Belgio ekde 2003. Klasika arta klerigado (mandeseĝnado kaj pentrado, historio de artoj) kaj studoj de modernaj aspektigaj programoj (*Adobe Creative Suite, QuarkXPress*) estis bezonataj por el hobia grafikistino iĝi profesia. Julia jam de kelkaj jaroj laboras kiel grafikistino por Flandra Esperanto-Ligo (FEL) kaj inter aliaj aspektigis la kovrilojn

de FEL-libroj. Krom la esperantlingvaj eldonoj ŝi aspektigas ankaŭ anoncojn, afiŝojn, katalogojn, vestaĵojn kaj eĉ aŭtojn ... por turisma firmao en Gento. Esperanton ŝi lernis en Tiĥvin (Rusio) en 2000, danke al la tre entuziasma instruisto Mikaelo Bronŝtejn. En sia libera tempo ŝi ŝatas vojaĝi kaj promeni en nekonataj lokoj, tiel kaptante inspiron por novaj pentraĵoj.

Al Julia la tuta MONATO-skipo diras „Bonvenon en nia rondo!”, kaj al Farri ĝi deziras ĉion bonan en la nova entrepreno!

Sincere via

Paŭl PEERAERTS



www.monato.net

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monato revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 29a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represo kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.

Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseoj:** Sendu al la koncerna redakto-ro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslands-presse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congle-

ton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** Nicola Ruggiero, via Trento, 59 I-70042 Mola di Bari (BA). Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net.

• **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/a 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslands-presse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Ĉu bojkoto?

Kial oni dezirus bojkoti la okazigon de la Olimpiaj Ludoj en Ĉinio? (Monato 2008/4, p. 5) Vere tio estas ŝanco por vidi kaj sperti, kio okazas en Ĉinio.

Ĉiu homo rajtas elekti la rajton de libero en diversaj flankoj. Efektive vi ne perfortu iun ajn por alirigi lin al via privata pensa koncepto. Tamen la objektiva fakto superas la elokventajn paroladojn! Bonvolu persone viziti Tibeton kaj vidi klare, kio okazas en Tibeto!

Hu GUOPENG
Ĉinio

Ĉu bojkoto? (2)

La Olimpiaj Ludoj estas la kulmino de ŝtata ŝovinismo. Oni spektakligas mondscale la atingon de sportistoj, kaj registaroj tute senhonte glorigas sin per tio. Sportistoj tre volonte lasas sin manipuli kontraŭ tio ke ili famiĝas mondscale dum unu aŭ kelkaj jaroj. Sed estas tre maljuste, ke monpotencaj landoj povas facile doni ŝancojn al siaj landanoj kaj, sekve, la sopiratajn medalojn, dum en aliaj mondopartoj sportistoj ne havas monon eĉ por aĉeti siajn ŝuojn.

Mi proponas bojkoti ne Ĉinion sed la Olimpiajn Ludojn. Homoj amase vojaĝu al la lando, sed ne ĉeestu la sporteventojn. Anstataŭe ĉiu vizitanto fariĝu raportisto kaj donu subtenon al subpremataj tibetanoj kaj aliaj.

Karles BERGA kaj MOLINA
Katalunio

Ĉu bojkoto? (3)

Estas vero, ke kulpas nur Internacia Olimpika Komitato (IOK), kiu akceptis la decidon aranĝi la Olimpiajn Ludojn en Ĉinio. Ne estas la unua fojo: ĉu prudente agis la membroj de IOK, akceptante la invitojn de Germanio sub Hitler aŭ de Sovetio sub Breĵnev? Ĉu ne estis monde konataj la faktoj, kiuj sendube devus malebligi alvenon de la Olimpikoj en tiujn ŝtatojn?

Sed bojkoti la Ludojn nun, uzante kiel pretekston nur la eventojn en Tibeto, estus horora ofendo por la sportistoj de ĉiuj landoj, kiuj verve preparadis sin dum la pasintaj jaroj, sed nun perdis la ŝancon konkuri.

Miaopinie ĉiuj pledantoj por la homaj rajtoj devas amase ekbojkoti la elekton de IOK tuj post la konfirmo, se la elektita ŝtato ne estimas la Deklaracion de Homaj Rajtoj.

Mikaelo BRONŝTEJN
Rusio

Ĉu bojkoto? (4)

Temas pri tre grava problemo. Oni ja scias, ke Ĉina Popola Respubliko invadis Tibeton, kaj ke, en la daŭro de la lastaj jardekoj, ĝi persekutadis la loĝantojn, iliajn religion kaj kulturon. Aldone, la lan-

don okupis milionoj da ĉinoj, kiuj estas vole-nevole senditaj al tiu lando por senradikigi ĝiajn lingvon kaj kulturon. Hodiaŭ, verŝajne, ili jam konsistigas la plimulton de la loĝantaro ... Se oni konsideras, ke en la lastaj jaroj la situacio en Tibeto tute ne pliboniĝis, sed, male, plimalfaciliĝis, kiel IOK povis entute akcepti la kandidatecon de tia lando?

Estas vere, ke sporto ne devas enmiksiĝi en politiko, sed oni scias, ke ja okazas la malo: politiko ĉiam enmiksiĝis en sportaj aferoj. Jam dum la helenaj Olimpiaj Ludoj aŭ religiaj festoj oni fakte profitis de la pacotagoj por plifortigi sian politikan aŭ militan situacion; la Olimpiaj Ludoj de Berlino en 1936 estis ekzemplo pri totala influo de politiko sur la sportaj idealoj, kaj okazos same en Pekino: ankaŭ tiam tiuj ludoj utilos al la nuntempa registaro por montri la grandiozajn atingojn de la reĝimo ...

Mi konsentas kun Stefan Maul (Monato 2008/4, p. 5), ke estas neoportune bojkoti la Ludojn: la sportistoj preparis sin longe, kaj estus vere malbona ago kontraŭ ili. Sed oni povas ĉiokaze montri sian opinion pri tio, kio okazas en Tibeto kaj en Ĉinio. Mi sugestas, ke la sportistaj teamoj marŝu, sekvante ne nur la flagon de sia ŝtato, sed ankaŭ la flagon de Tibeto.

Roberto TRESOLDI
Italio

Ĉu bojkoto? (5)

Oni ne punu ĉiujn ĉinojn per bojkoto. Tio certe multe pli forte trafos la popolon, ol la estraron. Bojkoto ne solvos la gravajn problemojn en Tibeto. Eble la homsvarmo, kiu ekestos dum la Olimpiaj Ludoj, estos okazo por paroli pri la vivo en Ĉinio. Oni eble povos de pli proksime vidi kaj taksu la agadojn de la politikistoj. Vere estas, ke la Internacia Olimpika Komitato devus pripensi tion antaŭ ol atribui la Olimpiajn Ludojn al Ĉinio, sed nun oni devas esti tre atentaj, ne pagigi la popolon pro la malbonaĵoj de la estraro. Devas esti io fareda por montri nian malkontenton pri la genocido en Tibeto kaj peti, ke la estraro traktu tiun problemon rapide, sed sen atenci al la etaj bonaj modifoj, kiuj estis jam donitaj al la popolo, eĉ se ili estas etaj! Tiu problemo estas vere, vere grava problemo, kiu laŭ mi ne solviĝos baldaŭ, bedaŭrinde!

Josée BOCCADIFUOCO
Francio

Ĉu bojkoto? (6)

Esperantistoj ne alvoku pri iu bojkotado. Estu ni pozitivaj ne negativaj en la agoj kaj elparoloj. Ĉu iu deziras defendi la tibetanojn? Bone! Skribu pri ili, pri la okazaĵoj en Tibeto kaj ĉirkaŭe, helpu disvastigi veran informon, kiun esperan-

tistoj ja povas ĉerpi el multaj fontoj, ne nur gepatralingvaj. Sed perdi la energion al negativaj agoj (bojkotado inter ili), ne decas. Pli bone rakontu pri historio de eventoj, provu esplori la situacion pri detale ol tion faras la amaskomunikiloj, kiuj (kiel jam multfoje pruvite) rakontas pri ĉiuj eventoj nur ĉapele ... Ĉiam necesas kompari diversfontajn informojn, eĉ tiam, kiam ĉio ŝajnas tute klara. Ĝuste en tiu ĉi kampo ni agu. Estu sportludoj sportludaj.

Jouko LINDSTEDT
Finnlando

Ĉu bojkoto? (7)

Mi ne scias, ĉu la bojkotado helpus al la tibetanoj aŭ ne. Sed min mirigas la antaŭsupozo en iuj komentoj, laŭ kiu la olimpia sporto estas ia nobla tereno, kiu devas resti ekster politiko (kaj eĉ homaj rajtoj, ŝajnas). La nuntempaj pintaj sportistoj estas salajrataj profesiuloj, distristoj, kies rolo estas sama, kiel tiu de la popularaj muzikistoj kaj filmaj steluloj. Aldone, multaj el ili uzas dopaĵojn – iuj el ili estis kaptitaj pro tio, iuj ankoraŭ ne, kaj la nedopatoj povas en multaj branĉoj esti malplimulto. Ke tia sporto restu ekster politiko, egalas al la postulo, ke la komerco kaj ekonomio restu ekster politiko. Tio ne eblas.

Maksim GRIŜIN
Rusio

Ĉu bojkoto? (8)

Ankaŭ en multaj aliaj landoj ekster Ĉinio estas ne respektataj la homaj rajtoj. Lastjare okazis UK en Japanio, lando, kiu ankoraŭ aplikas la mortpunon. Same mia loĝlando Svislando eksportas armilojn kaj negocas per morto – kiun ni bojkotu?

Dieter ROOKE
Svislando

Ĉu bojkoto? (9)

Ĉinio estas disvolviĝanta lando kun 56 nacioj, kaj la tibetanoj estas unu el ili. Tibeto estas nedisigebla parto de Ĉinio. Post la establiĝo de la ĉina popola respubliko la ĉinoj, inkluzive de la tibetanoj, vivas vivon pli kaj pli bonan kaj riĉan, precipe dum la lastaj 30 jaroj, danke al la ĉina registaro. Tion preskaŭ ĉiuj ĉinoj opinias. Kaj la ĉina registaro ĉiam donas grandan atenton al Tibeto, ekzemple sendante altnivelajn kaj veteranajn kuracistojn kaj flegistinojn por vivteni la sanon de tibetanoj kaj sendante spertajn sciencistojn por disvolvi la tibetan ekonomion.

La olimpiaj ludoj estas nur sporta kunveno kaj ne politika diskuto. Tiam multaj neĉinoj vizitu Ĉinion kaj propaokule vidu ĝin. Ili pli bone komprenos la ĉinojn. Ĉinoj estas pacamantoj, kiuj neniam invadis aliajn landojn historie.

Jinming XU
Ĉinio

Gigantismo

de Stefan MAUL



Terminalo 5 de la flughaveno de Londono - konstruaĵo, kiu kostis 5,6 miliardojn da eŭroj

Espereble en aprilo vi ne devis uzi kiel pasaĝero la modernegan terminalon 5 de la flughaveno de Londono. Vi ne plu havus bonajn nervojn, ĉar pakaĵoj malaperis en la faŭko de la haveno, liftoj ne funkciis kaj homoj perdiĝis en la vastaj koridoroj de konstruaĵo, kiu kostis 5,6 miliardojn da eŭroj. Ĝi estas unu el pluraj ekzemploj lastatempaj de gigantismo, kiu fiaskis parte aŭ eĉ komplete.

Ni restu ĉe aviado. La usona kompanio *Boeing* devis prokrasti liveradon de la nova longdistanca flugmaŝino *787 Dreamliner*; la „rev-avio“ iĝis inkuĉo por la entrepreno, kiun atendas miliardsumaj monperdoj kaj postuloj de kompenco. La konkuranta eŭropa kompanio *Airbus* (aerbuso) havis similajn spertojn pri sia aviego *A380* post fuŝado en muntado. Ankaŭ *Airbus* devis elspezi miliardojn por ripari la fuŝon. Neeviteble tiaj fiaskoj malbonigis la reputacion de la du entreprenoj.

Ŝtonepoko?

La problemoj trafas ne nur avikonstruantojn, sed ankaŭ aliajn industriojn. Projektegoj jen kaj jen misevoluas, iĝas multege pli kostaj kaj komplikaj ol planite. Suferas precipe klientoj, por kiuj la epoko de alta teknologio iĝas subite ŝtonepoko. La fenomeno tamen ne estas nova, ĉiam homoj estis arogantaj kaj vante kredis, ke ili povas fari ĉion. La konstruantojn de la turo de Babelo punis la dio mem, sed tio ne detenis postajn generaciojn ĉiam denove plani gigantisme, supertaksante siajn kapablojn. Ili havis manion de farebleco, kiu sufokis ĉian skeptikon.

Modernaj ekzemploj estis la projektegoj de la Sueza kaj Panama kanaloj, fruaj provoj de tutmondiĝo, kiuj komence ankaŭ fiaskis kaj ekfunkciis nur longe post ekkonstruado.

La fiasko ripetiĝis ĉe Eŭrotunelo inter Francio kaj Britio. La kompanio de la 50-kilometra tubo sub la Norda Maro dum la pasinta jaro preskaŭ

bankrotis. Ĝi estis (provizore) savita, nur ĉar kreditoroj donacis al ĝi duonon de plurmiliardaj ŝuldoj.

Absurda ideo

Lasta aktuala ekzemplo de fiaskinta gigantismo estas projekto en Germanio. Politikistoj havis la absurdan ideon ligi la ĉefstacidomon de Munkeno kaj la flughavenon per magnetŝveba trajno *Transrapid*. Ĉiuj klarvidaj fakuloj prognozis, ke tia projekto ne taŭgas, ĉar la rapidega trajno estas intencita por longaj distancoj, ne por 37 kilometroj tra dense loĝata regiono (vidu detalojn en *El mia vidpunkto* de novembro 2007). Nun montriĝis, ke la kostoj por la projekto eksplodis jam en la plana fazo, kaj fine ankaŭ politikistoj devis agnoski, ke ilia gigantomano estis utopia, kaj haltigis la projektigon.

Estas multaj kialoj, kiuj fiaskigas gigantismajn projektojn, ne nur aroganteco kaj vanteco de homoj. En la okazo de *Boeing* ekzemple unu el la kialoj estis, ke la kompanio produktigis gravajn komponantojn en diversaj (malalt-salajraj) landoj, kiel oni kutimas en epoko de tutmondiĝo. Sed anstataŭ ŝpari pro malaltaj salajroj nun la kompanio devas elspezi multe pli por plibonigi malaltajn kvalitojn. Alia ofta kialo estas, ke entreprenoj, por ŝpari, ne dungas sufiĉe da fakuloj en la meza parto de plansekcioj; mankas do tiuj homoj, kiuj devus ellabori gravajn detalojn, por ke poste vere povu funkcii projekto.

Por eviti tiajn fiaskojn, necesus reveni al homa modesteco kaj plani nur tiajn projektojn, kiujn eblas realigi per ordinaraj rimedoj. Sed ne timu, gigantismo ne mortos! Jam iuj planas raket-avion, kiu bezonas por vojaĝi de Eŭropo al Usono nur ĉirkaŭ unu horon. Kiu bezonas ĝin? Neniu, sed homoj ja ne lernas el faritaj eraroj. Kaj ĵus mi legis, ke iu arkitekto revas konstrui turon multajn kilometrojn altan. Saluton el Babelo! ■

Koro, kiu neniam serbe batis

Kosovo apartenis al la mezepoka serba reĝlando de la 12a ĝis la 14a jarcento. En 1389 okazis granda turka invado, tiel ke eblas diri, ke tiam simbolo disfalis la „granda serba imperio”. Fakte, tamen, la mezepoka serba regno disfalis en 1459.

Kosovo reeniris Serbion en 1912, post la dua balkana milito, kiam la turkoj post preskaŭ kvin jarcentoj definitive estis forpelitaj de Balkanio. Post tiom da jarcentoj Kosovo jam perdis ajnan serban karakteron: albanoj kaj turkoj konsistigis la plimulton de la loĝantaro. Kvankam dum la lastaj 96 jaroj (1912-2008) mite la „koro de Serbio” estis Kosovo, en realo neniam tiel estis.

Malgraŭ klopodoj de monarkista Jugoslavio (1918-1945) ŝanĝi la etnan strukturon en Kosovo, albanoj konsis-

tigis etnan plimulton. Cetere Kosovo ne figuris serioze kaj profunde kiel patriota simbolo en serbaj animoj. Kontraŭe, Kosovo por multaj serboj dum jaroj estis simbolo de malpuro, malriĉo kaj primitivismo, ĉar konsiderata etne albana.

Animo

La reĝimo de Slobodan Milošević (1987-2000) politike ekuzis Kosovon alimaniere. Per mitologio kaj per „nacia kolektiva memoro” ĝi propagandis pri Kosovo kiel „koro kaj animo de Serbio”. Hodiaŭ serboj reinventas ĉi tiun tezon, argumentante, ke sen Kosovo ne ekzistos Serbio. Sed la plimulto de la serboj neniam vizitis Kosovon.

Nuntempe en Kosovo loĝas 2 000 000 da albanoj kaj 150 000 serboj (90 % : 10 %). Kosovo, do, estas

jam delonge etne tute perdita por Serbio – ankaŭ morale kaj politike.

Evidentas la kialoj: unuavice la militaj krimoj kaj aliaj teruraĵoj plenumitaj en Kosovo de la reĝimo de Milošević inter 1989 kaj 1999. En 1989 li ĉesigis la aŭtonomion, kiun al Kosovo garantiis la ŝtata konstitucio. Lia polico murdis 32 ministojn, kiuj protestis en minejo Stari Trg, kaj kiam Milošević transiris la linion, post kiu oni ne povas reveni al dialogo, albanoj organizis paralelan reg-sistemon.

En marto 1998 la serba polico forbruligis albanan vilaĝon, kaj sekvis forta kaj bone preparita albana popol-leviĝo. Pro policaj krimoj kontraŭ albanoj intervenis en 1999 Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO). Tiam, venĝe, serboj detruis aliajn vilaĝojn kaj forpelis 800 000 civilulojn al Albanio aŭ Makedonio.

Sorto

Pro tio ne eblas kompari la sorton de Kosovo kun tiu de aliaj etnaj popoloj, ĉar plejparte ili ne tiom suferis. Ne intervenis NATO kaj ne sekvis la murdado. Tiel, morale kaj politike, Serbio perdis Kosovon jam en 1999, ne en 2008.

Laŭ internacia juro, kies limoj iufoje tre elastas, Kosovo estas parto de Serbio. Sed kiamaniere dum la homa historio ŝanĝi ŝtatlimojn, se ne per militaj invadoj, armitaj fortoj kaj per disŝiro de internacia juro? Ĉu de historia perspektivo ekzistas ŝtato eŭropa, kiu ne estis iam okupanto kaj okupato, invadato kaj invadato? Oni ne forgesu, ke ankaŭ Serbio per invado kaj ne per juro „ricevis” Makedonion en 1912 kaj Montenegron en 1918.

Mi estas serbo. Patrioto. Sed ankaŭ realisto. Grandaj potencoj agnoskis la novan ŝtaton de Kosovo. Tion ĝis nun faris jam 36 landoj. Serbio pensu pri sia estonteco: pri modernigo, pri malfermigo al la mondo, pri membriĝo en Eŭropa Unio. Mitojn ĝi nepre lasu en sia politiko.

Zlatoje MARTINOV
Serbio



Serbio perdis Kosovon jam en 1999, ne la 17an de februaro 2008.

Sukcesas du el tri



Flagoj de NATO-membroj

Fruaprile okazis en Bukareŝto, Rumanio, kunveno de Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO). Tri ŝtatoj de okcidenta Balkanio – Albanio, Kroatio kaj Makedonio – esperis esti akceptataj kiel novaj NATO-membroj. Sukcesis Albanio kaj Kroatio, sed pro malkonsentoj inter Makedonio kaj Grekio, rilate la nomon de la unua, Makedonio ne akceptiĝis.

Jam de 17 jaroj Albanio pacience preparis sian NATO-membriĝon. Albanaj pacgardistoj jam delonge servas en Bosnio, Irako kaj Afganio. NATO-aligo signifas por Albanio ne simple pli da sekureco, sed ankaŭ pli da fremdaj investoj, kaj do ekonomia stabileco, kaj pli da ŝancoj por aliĝi poste ankaŭ al Eŭropa Unio.

Plena albana integriĝo en NATO daŭros iom da tempo. Venos NATO-delegacio al Albanio kaj la afero estu ratifita en la albana parlamento. Ĉiuj politikaj partioj en Albanio bonvenigis la novaĵon.

Albanio eniris la Pakton de Varsovio en 1955 kaj restis praktike ĝis 1961, kiam la sovetia ĉefo Ĥruŝĉov denuncis la landon. Albanio restis jure en la pakto ĝis 1968, kiam paktanoj atakis la eksan Ĉeĥoslovakion por restarigi reĝimon favoran al Moskvo.

Bardhyl SELIMI



Albanio kaj Kroatio nun apartenas al NATO. Makedonio ankoraŭ ne.

Ukrainaj urbestroj



Mihail Dobkin

Jam delonge en Ĥarkivo, Ukrainio, oni batalas kontraŭ la urbestro Miĥail Dobkin. Lastatempe la batalo akriĝis, kiam oni forportis plurajn kilogramojn da paperoj por kontroli la urbajn financojn. Fine Sekureco de Ukrainio (eksa KGB) atakis la oficejon de la urbestro kaj poste komencis procesi kontraŭ Dobkin. Ĉefaj kulpigoj – misuzo de urbaj financoj, fimanovrado pri terpecoj, eĉ komercado pri narkotaĵoj. Okazas io simila en Kievo koncerne la tiean urbestron Leonid Ĉernoveckij.

Dmitrij CIBULEVSKIJ



Leonid Ĉernoveckij

ALBANIO

Tragedio en Gerdec

Mortis dekoj da homoj kaj vundiĝis centoj da aliaj, kiam en marto eksplodis en la vilaĝo Gerdec, 12 km for de la albana ĉefurbo Tirano, fabriko por malmunti malnovan municion. Ĉe la fabriko troviĝis en kvar tuneloj ĉ. 10 000 tunoj da artileria municio.

Dum la 1950aj kaj 1960aj jaroj eniris Albanion multe da municio el Sovetio kaj Ĉinio, kadre de la tiama strategio de la komunisma reĝimo pri la „ekstera danĝero” imperiisma-reviziisma. Pro tiu ĉi strategio elspezis la reĝimo de Enver Hoxha [hodĵa] 22 % de la tiama landa buĝeto, tiel ke tra Albanio disvastiĝis 100 000 tunoj da diversspeca municio.

Post la 1990aj jaroj la registaro, kons-

cia pri la danĝero rezulte de tiom da municio kaj armiloj, komencis longdaŭran projekton por ilin neniigi. Antaŭ kelkaj monatoj la registaro anoncis, ke estas detruitaj ĉiuj surteraj kaj surmaraj minoj, kune kun multe aliaj armiloj. Tamen restis plejparte la municio.

Homa eraro

Laŭdire en Gerdec oni komisiis la neniigon de la tiea municio al usona fakkompanio. Tamen esploroj montris, ke respondecis loka firmao, kiu dungis 14-jarulojn. Ŝajnas, ke kaŭzis la eksplodon homa eraro: okazis unue eta incendio, kiu estigis malgrandajn eksplodojn; poste okazis granda eksplodo, kies fumnubo similis laŭ atestintoj al tiu de

Hiroŝimo.

Tuj reagis la polico kaj la armeo, kiuj evakuis ĉirkaŭ 4000 loĝantojn de apudaj vilaĝoj. Nur poste venis helikopteroj kaj aliaj veturiloj por forigi la mortintojn kaj la vunditojn. La evento kaptis la atenton de la albana publiko, kiu donis sangon por helpi la viktimojn. Same reagis membroj de la albana parlamento kaj ankaŭ albanoj en Kosovo. Venis kuracistoj el najbaraj landoj, inkluzive de Makedonio, Grekio kaj Italio.

La albana prezidanto, Bamir Topi, kunvenigis la Nacian Sekurecan Konsilion por analizi la tragedion kaj efektiviĝi rimedojn por eviti similajn katastrofojn.

Bardhyl SELIMI

AKCIOJ

Profitas eksterlandanoj

En 1993 la albana registaro komencis privatigi la ŝtatan ekonomion. Tiel ĝi celis pliiĝi produktadon kaj kvaliton de varoj kaj servoj. Kadre de privatigo ĝi disdonis tiel nomatajn valorpaperojn al ĉiuj plenkreskaj civitanoj. Tiamaniere ili povus fariĝi akciuloj en eksaj ŝtataj entreprenoj.

La plimulto de la civitanoj hezitis, ne fidante la efikecon de la eluzitaj ŝtataj entreprenoj. Ili preferis forvendi nigramerkate la valorpaperojn je dekono de ties valoro. Tiel pluraj individuoj akaparis konsiderindan kvanton de la valorpaperoj kaj investis en strategiaj kaj aliaj esperplenaj entreprenoj.



HTTP://WWW.AIBCA.COM

Alloga

En la aferon enmiksiĝis ankaŭ eksterlandaj kompanioj. Unu estis la kompanio Anglo-Adriatika kun sidejo en Dublino, Irlando. Ĝia prezidanto estis Declan Ganley [deklan ganli], kies diversaj firmaoj aktivis tra la mondo interalie en transportado kaj komunikado. Anglo-Adriatika intencis partopreni en

la privatigo de la turisma industrio de Albanio, ĉefe ĉe la suda marbordo. Al albanoj ĝi aspektis alloga kaj kelkaj uzis siajn valorpaperojn por fariĝi akciuloj de Anglo-Adriatika.

Tamen ŝajnas, ke la vera celo de Ganley estis ekspluati la valorpaperojn por aĉeti nemoveblaĵojn en diversaj landoj kaj ludi en la internacia borso. La situacio memorigas pri la fifamaj tiel nomataj „piramidoj”, kiuj promesis riĉon al multaj albanoj, sed kiuj envere ilin ruinigis – kaj samtempe en 1997 detruis la tiaman albanan ŝtaton. Nun, pro la agado de Anglo-Adriatika, denove perdas albanoj, dum pliriĉiĝas la Ganley-firmao.

Bardhyl SELIMI

Kaptukoj – kaj kapdoloroj



JEREMY HIGGS

Doris Graber portas oranĝkoloran kaptukon, malferme volvitan ĉirkaŭ sia hararo. Ĝi aspektas kiel moda akcesoraĵo, ne kiel kredkonfeso islama. Tamen tiu eta sendanĝera kaj senofenda vestaĵero kaŭzis en Germanio longdaŭrajn juristajn kverelojn.

La 58-jaraĝa instruistino laboras en lernejo en Stutgarto, Baden-Virtembergo, depost 1973. Komence ŝi estis katolika, en 1984 ŝi konvertiĝis al islamo. Ekde 1995 ŝi portas kaptukon por indiki sian novan religion. Sed en 2003 Baden-Virtembergo enkondukis paragrafon en la leĝon, kiu malpermesas al instruistoj sintenon, kiu povus endanĝerigi religian neŭtralecon kontraŭ gepatroj kaj gelerantoj aŭ la pacon en lernejoj. Ekde tiam la lernejo-administracio klopodas malpermesi portadon de kaptukoj.

Antaŭ kelkaj jardekoj okazis simila strangaĵo. Kelkaj geinstruistoj laŭ tiama kvazaŭ „modo” aliĝis al grupoj de la tiel nomata Bhagwan-sekto [bagvan] kaj sin vestis en ruĝa koloro. La registaro malpermesis tian vestaĵon, do fakte malpermesis ruĝkolorajn vestaĵojn.

Maldungebla

Laŭ la konstitucio de la Federacia Respubliko Germanio neniu povas esti malhelpata aŭ preferata pro sekso, deveno, raso, lingvo, religio aŭ handicap (artikolo 3 de la germana konstitucio). Laŭ artikolo 4 la ŝtato garantias senĝenan praktikon de iu ajn religio. Artikolo 33 garantias, ke ĉiu havu egalan rajton labori en publikaj servoj laŭ siaj kapabloj kaj kvalifikoj. Tiun pruvis la islama instruistino jam jarojn antaŭe:

dum jaroj ŝi estas dumviva, do ne maldungebla oficistino.

En 2006 juĝistoj argumentis, ke la ŝtato ne rajtas malpermesi kaptukon al instruistinoj kaj samtempe permesi vualon al monaĥinoj. Ĝi estas ne nur tradicio kaj prezentado de kulturvaloroj, sed ankaŭ indiko de persona religia konvinko, kiel la kaptuko de islamanino.

Tamen la administracia kortumo en Mannheim [manhajm] malpermesis al Doris Graber kaptukon en lernejo. Klarigis la kortumo: „Instruistino lezas sian ofican devon, se ŝi portas en lernejo kapkovraĵon pro percepteblaj religiaj kialoj.” La instruistino ne rajtas argumenti, ke oni traktis ŝin alimaniere ol monaĥinojn. La rajto de monaĥinoj porti ordenajn kostumojn en lernejoj estas „historia kazo de escepto”. Ekzistas interkonsentoj kun siatempaj monaĥejoj: lernejoj hodiaŭ troviĝantaj sub ŝtata gvido. Pacta sunt servanda – kontraktoj estas observendaj.

Humaneca

Kvankam la leĝoj malpermesas vestaĵojn, emblemojn aŭ aliajn simbolojn, kiuj povus damaĝi neŭtralecon, ili eksplicite permesas simbolojn konformajn al kristana kaj humaneca okcidenta tradicio. Tiel oni argumentis antaŭ jardekoj favore al la tiel nomata kutimjuro.

La instruistino mem diris, ke jam de 13 jaroj ŝi portas kaptukon, kaj neniu indignis aŭ ofendiĝis. La kortumo atestis, ke dum 30 jaroj ŝi pruvis sian utilon en lerneja servo. Tamen la kaptuk-malpermeso validas ankaŭ por dumviva oficistino „laboranta multaj jaroj ne kritikata de gelerantoj kaj gepatroj kun tia kapkovraĵo”.

Kasacian plendon la kortumo ne permesis. Eblas apelacii nur al la Federacia Administracia Kortumo. La baden-virtemberga ministro pri kulturo, de la dekstra kristan-demokrata partio, bonvenigis la verdikton. La ĉefino de la verdula partio kontraŭis: „Tia decido plifortigos la senton ĉe multaj islamanoj, ke ili estas malbonvenaj kaj repuŝataj.”

Jomo IPFELKOFER

AVIADO

Forflugu la malbonaj ciferoj

La litova ŝtata flugkompanio „flyLAL-Lithuanian Airlines” decidis ŝanĝi la internacian kodon, kiu unike identigas ĝian valorpaperojn. La nuna t.n. ISIN-kodo (angle: „International Securities Identification Number”) LT0000126666 ne plu taŭgas.

Linus Dovydenas, la estro de la flugkompanio, klarigas: „En aviado, kiel en neniuj alia fakoj, gravas la ciferoj. En la tuta mondo oni penas eviti ciferojn 13 aŭ 666. Ĉiuj scias, ke en la aviadiloj



La litova flugkompanio penas liberiĝi de maltaŭgaj ciferoj.

forestas la 13a sidloko-vico, kaj laŭeble ne estas ripetata la cifero 6. Tial ni volas ŝanĝi la kodon.”

Dovydenas aldonis, ke la kompa-

nio reviziis ĉiujn ciferajn kombinaĵojn, kiujn ĝi uzas. Tiel ne restos „malbonaj” ciferoj.

LAST

SKULPTAĴO

Masohisme monumente

Baldaŭ en Lviv, Ukrainio, oni konstruos monumenton al la tie naskiĝinta germanlingva verkisto Leopold von Sacher-Masoch [fon zaĥa mazoĥ] (1836-1895), kiu en sia verkado pritraktis seksan suferadon kaj donis sian nomon al la koncepto de masohismo. La monumento 1 m 70 cm alta havos ion nekutiman: eblos meti manon en ties maldekstran poŝon kaj palpi „virajn proprajojn”. Cetere, ĉe la brusto, estos lupeo, tra kiu eblos spekti erotikajn bildojn. La monumento kostas iom malpli ol 10 000 eŭrojn.

Loĝantoj de Lviv opinias, ke la popolo ĝeniĝos, serĉante en la poŝo de la monumento. Ili kredas, ke la monumento pli interesos turistojn. La statuo aldoniĝos al la jam ekzistantaj pri la soldato Ŝvejk kaj pisanta hundo.

Dmitrij CIBULEVSKI

foto:

La germanlingva verkisto Leopold von Sacher-Masoch, „patro” de la masohismo.



ALBANIO

Postfesta tragedio



AUTYNT

Nacian funebran tagon deklaris la albana registaro pro familio dumfeste droninta. Samtempe la registaro promesis kovri ĉiujn funebrajn elspezojn por la 16 mortintoj, kiuj pereis, kiam ilia barko – kun spaco oficiale nur por 10 personoj – renversigis en artefarita lago Farka, apud Tirano.

La entute 20 familianoj estis festintaj naskiĝdatrevenon en restoracio translaga. La tragedio okazis, kiam ili revenis post la festo. Inter la mortintoj estis du kvinjaraĝaj ĝemeloj kaj sep virinoj. Enketas la polico pri la afero. La albana gazetaro starigis multajn demandojn pri la sekureco de surlaga navigado.

Bardhyl SELIMI



Ukrainoj, kiuj deziras vizon por eniri Pollandon, devas kelktage stari ekster la pola konsulejo en Lviv. Ĉiutage ricevas vizojn nur ĉirkaŭ 50 petantoj, ĉar en la konstruaĵo mankas kaj spaco kaj homfortoj por pritrakti pli da vizoj. Tio signifas, ke ekstere troviĝas homoj, kiuj „vendas” lokojn en la vico kaj ilin „konservas” por tiuj, kiuj pretas pagi. Fojfoje okazas interbatiĝoj, kaj antaŭ nelonge svenis atendanta virino. Baldaŭ la vizo-sekcio okupos pli grandan ejon. Promesite estas priservi ĉiutage pli ol milon da vizo-petantoj.

Dmitrij CIBULEVSKIJ

UKRAINIO

Vizo-vico

Litovoj ŝatas bele vestiĝi



En la elspezokorbo de averaĝa litovo vestaĵoj kaj ŝuoj okupas pli solidan lokon, ol en tiu de averaĝa eŭropano.

Evidentiĝis, ke en la elspezokorbo de averaĝa litovo vestaĵoj kaj ŝuoj okupas pli solidan lokon, ol en tiu de averaĝa eŭropano. Kvankam la elspezata sumo estas nur duono, litovoj bele vestiĝi kaj tiucele elspezadi emas ne malpli ol pli bone enspezantaj malnovaj EU-anoj. Perlaborinte pli, ili ankaŭ pli elspezas.

disvolviĝo: „Riĉa homo ne multe zorgas pri sia vestado. La kialo estas, ke li aŭ ŝi ofte ŝanĝas vestojn. Kiam homo ne ofte ŝanĝas ilin, li aŭ ŝi pli atentis siajn vestaĵojn. Tiam vestoj fariĝas objekto de la statuso kaj prestiĝo.” Laŭ li, vere riĉaj homoj sian statuson pli volonte demonstras alimaniere: per aŭtomobilo, jaĥto aŭ vilao. Ankaŭ tiuj ĉi objektoj fariĝas pli kaj pli gravaj en Litovio. „Averaĝe enspezanta litovo, almenaŭ viro, facile povus vestiĝi kiel riĉulo. Kiam homo ne povas akiri aliajn prestiĝajn objektojn, li pli atentis vestaĵojn kaj volonte investas tiudirekten”, aldonis Navaitis. Dume ino, liaopinie, havante relative malaltan salajron kompare kun aliaj eŭropaninoj, vestiĝas pli ŝike pro tio, ke ... ŝi ne tiom

suferis pro feminismo.

Julita Varanauskienė, financa spertulino de la banko SEB Vilniaus bankas, prognozas, ke ankaŭ estonte litovoj ne striktigos siajn elspezojn por vestoj kaj ŝuoj. Ŝi asertas, ke la elspezograndado por vestaĵoj kaj ŝuoj unualoke dependas de financaj eblecoj. Se kreskas la enspezoj, ankaŭ en la elspezokorbo grandiĝas la parto de tiucelaj elspezoj. La bankistino atentigas, ke varoj de tiu ĉi kategorio malplikiĝas: „Unuvorte, dum la prezoj malkreskas, nia volo aĉeti kreskas. Tamen aktiviĝis nur tiuj, kiuj enspezas averaĝe aŭ pli. Malriĉuloj por vestado elspezas preskaŭ same, kiel antaŭ tri jaroj.”

LAST

En 2006 unu EU-ano al sia vestado kaj ŝuoj averaĝe dediĉis 800 eŭrojn – 100 eŭrojn pli ol dum la antaŭa jaro. Laŭ statistiko de Eurostat, averaĝaj litovo kaj estono tiucele elspezadis po 400 eŭrojn en 2006 kaj po 300 eŭrojn en 2005. EU-ano por vestaĵoj kaj ŝuoj averaĝe elspezis 5,7 % de siaj tutaj elspezoj, dume litovoj superis tiun indicon kaj elspezis 8,1 %.

Spertuloj ne miras

Kial litovo modeste salajrata tiel ŝatas bele vestiĝi? Psikologo Gediminas Navaitis opinias, ke la emo bele vestiĝi spegulas malaltan nivelon de ekonomia



Rivalaj gastuboj



Nabucco [nabuko], laŭ la nomo de iama reĝo de Babilono

La 28an de februaro 2008 en Moskvo Hungario subskribis interkonsenton pri la Suda Fluo, gastubo, kiu liveros tergason el Rusio al Aŭstrio.



La ĉefa direkto estos tra Bulgario, Rumanio kaj Hungario.

Jam ekzistas gasodukto inter tiuj landoj, sed ĝi trairas Ukrainion. Tio estas problemo: okazas, ke la fluo de gaso tra Ukrainio iĝas nefidinda, ĉar tiu lando fojfoje ne kapablas pagi la liveritan gason. Ankaŭ el Rusio ĝis Ankaro estas funkcia tubo, sed oni elektis novan vojon sub la Nigra Maro. La ĉefa direkto estos tra Bulgario, Rumanio kaj Hungario. En la lasta lando estos konstruataj rezervujoj.

Alia grupo da entreprenoj planas

rivalan solvon ekde la regiono Irano-Azerbajĝano al orienta Eŭropo al Hungario. Ĝi nomiĝas *Nabucco* [nabuko], laŭ la nomo de iama reĝo de Babilono (ankaŭ konata kiel Nebukadnecaro). La celo estas ne dependi de Rusio. La plano estas tute nebula, ĉar la gasfontoj troviĝas en politike malstabilaj landoj kaj la provizo estas duba. Ŝajnas, ke fluos multe da gaso tra la *Suda Fluo*, antaŭ ol pretos *Nabucco*.

Karlo JUHÁSZ



Kio estas spiriteco?

Mi akceptas la inviton de la redakcio al diskuto de la demando pri la spiriteco (Monato 2007/6, p. 18). La diskuto ja necesas, ĉar la nocio „spiriteco” estas perceptata diverse.



„oni konfuzas la spiritecon, kiun posedas ĉiuj homoj, kun religio”

W. H. Simcock ĝuste rimarkas, ke „oni konfuzas la spiritecon, kiun posedas ĉiuj homoj, kun religio”, kaj ke „spirita” estas iom malpreciza koncepto, ke la vorto „spirita” havas multajn diversajn signifojn, ke oni ofte uzas la vorton, kvazaŭ ĝi havus la saman sencon kiel „religia”. Li donas

konkretajn ekzemplojn por montri, kio estas spirita. Li tamen ne donas difinon de la vorto. Per sia konkludo, ke „ne povas ekzisti ‘spirita vivo’; spiriteco estas rezulto de ekzaltaj, sublimaj momentoj travivitaj”, li limigas la nociojn „spirita” kaj „spiriteco”.

Mi klopodis trovi difinojn de la no-

cio „spirita” en du britaj kaj unu usona vortaro. Laŭ *BBC English Dictionary*, *HarperCollins*, 1992, la adjektivo „spiritual” (spirita) signifas: 1. Rilata al la homaj plej profundaj pensoj kaj kredoj pli ol al iliaj korpoj kaj fizika ĉirkaŭaĵo. 2. Rilata al la homaj religiaj kredoj. Ĉe tiu ĉi signifo estas esprimo „dekadenco de la spiriteco”. Tiu ĉi esprimo tamen limigas la sencon de „spiriteco” nur al la religia senco.

Laŭ la deka eldono de la *Oxford Dictionary* (Oksforda Vortaro), *Oxford University Press*, 1999, la vorto „spiritual” kiel adjektivo signifas: 1. Rilata al la homa spirito kiel kontrasta al la materiaj aŭ fizikaj aferoj. 2. Rilata al religio aŭ religia kredo. Laŭ *Webster’s Unified Dictionary and Encyclopedia* (Unuigita Vortaro kaj Enciklopedio de Webster), *H.S. Stuttman Company, Inc.*, Novjorko, 1959, la vorto signifas: Nemateria, rilata al la animo, sankta, religia. Sinonimoj: nemateria, nekorpora, intelekta, nemonda, pura, pia, sankta. Antonimoj: korporeca, monda, materia, tera, malpura, provizora, laika, sekulara. Per la prezentitaj sinonimoj kaj antonimoj la difino fariĝas iom pli kompleta.

Ni vidu la difinon de la bulgara vorto „duhoven, ~na, ~no, ~i” (spirita) kaj de la vorto „duhovnost” (spiriteco) en volumo 4 de la *Vortaro de la bulgara lingvo*, Eldonejo de la Bulgara Akademio de Sciencoj, Sofio, 1984. Estas donitaj kvar signifoj kune kun po kelkaj citaĵoj el verkoj de bulgaraj aŭtoroj. Jen ili estas: 1. Rilata al la interna, psika vivo de la homo, al liaj konscio, psiko, spirito,

animo. Kontraste al fizika, materia. 2. Kombine kun ligo, proksimeco k.s. tio, kio ekzistas inter du aŭ pli da homoj surkampe de la interna, psika vivo, rilate al iliaj ideoj, konceptoj, streboj, mondkoncepto, psikologio. 3. Rilata al la disvolviĝo de la kulturo, la scienco, la arto. 4. Rilata al la eklezio kaj la religio; eklezia, religia. Kontraste al laika, sekulara, civila. Ĉe tiu ĉi signifo „spi-

Lige kun la difino de la signifoj de la vortoj „spirita” kaj „spiriteco” mi ŝatus referenci iujn eldirojn kaj kvalifikaĵojn de la aŭtoritata rusa (sovetia) akademiano Dmitrij Sergejeviĉ Liĥaĉov (1906-1999), en kies koro de post 1958 ĝis lia forpaso Bulgario okupis apartan lokon. Li kvalifikis Bulgarion kiel „ŝtaton de la spirito”. Tiu ĉi kvalifiko naskiĝis el liaj meditoj pri la originaleco de la malnov-

influi aliajn popolojn. Li konkludas, ke tiun ĉi spiriton ne povis venki la fremdaj konkerintoj: Bulgario ja transvivis la preskaŭ 200-jaran bizancan jugon (1018-1186) kaj la preskaŭ 500-jaran otomanan jugon (1396-1878). Per tiuj ĉi liaj vortoj estas elstarigita la signifo de la spiriteco.

Se ni analizus la enhavon de la rubriko *Spirita vivo* de MONATO, ni konstatus,



rita” egalvaloras al „eklezia”, „religia”, „klerika”.

La vorto „*duhovnost*” (spiriteco) en la sama volumo, p. 490, havas la signifon de: 1. Kvalito de la spirito laŭ la unua signifo de la vorto „*duhoven*”. 2. Intelektaj kaj emocia agado, spirita esenco de la homo, psikeco. 3. Psika kaj intelekta sublimado, perfekteco, ĉeesto de spiritaĵoj, de riĉa spirita vivo. Tiuj ĉi difinoj ŝajnas al mi esti pli kompletaj kaj pli ampleksaj.

bulgara literaturo, kreita en la 9a kaj 10a jarcentoj surbaze de la parolata bulgara lingvo, fariĝinta frua literatura lingvo en Eŭropo. Laŭ akademiano Liĥaĉov, la ŝtato de la spirito estis konturita de la faro de la du fratoj Cirilo kaj Metodo kaj de iliaj disĉiploj kaj adeptoj. Laŭ li, ĝi ne estas politika formitaĵo, sed ideo pri la memkonscio kaj etna identeco, bazita sur la lingvo, alfabeto kaj literaturo, sufiĉe matura kaj spirite signifa por respondi al la komunhomaj bezonoj kaj

ke ĝi estas difinita de pli ampleksa percepto de la signifoj de la nocioj „spirita” kaj „spiriteco”.

Fine mi mencias la vorton „senspiriteco”, kiu signifas mankon de spiritaĵoj, kiuj lastatempe alarmas la socion pri la dekadenco de la spiriteco, perceptita en pli larĝa senco. Unu el tiuj aŭtoroj en Bulgario, kiu menciindas, estas profesoro Orlin Zagorov.

Dimitar HAGHIEV

KULTURO

Vatikana biblioteko



biblioteko. Ĝin vizitante, antaŭ ne-longe, papo Benedikto la 16a salutis kaj dankis la ducent homojn, kiuj diversnivele kaj diverstaske tie laboras, per, interalie, ĉi tiuj vortoj: „Estas via tasko konservi la sintezon inter kulturo kaj kredo, kiu spiras el la altvaloraj dokumentoj, kiujn vi gardas”.

Dum li haltadis por observi la papiruson Bodmer (tio estas papiruso el la fino de la dua aŭ el la komenco de la tria jarcento kun grandaj eroj de la evangelioj laŭ Luko kaj Johano; entute 144 paĝoj), oni informis la ĉeestantojn, ke baldaŭ eblos vidi en la reto plurmilojn de tiuj dokumentoj.

Apud la papiruso Bodmer kutime estas multe admirata kaj aprezata la *Codex Vaticanus* (Vatikana Kodekso), kiu estas unu el la plej antikvaj manskribitaj kodeksoj (el la 4a jarcento) kun preskaŭ la tuta malnova testamento kaj kun granda parto de la nova, greke skribita sur pergameno en uncialaj (majuskla) literoj.

Armando ZECCHIN

1 600 000 presaĵoj, 8300 inkunabloj, 75 000 manuskriptoj, 100 000 ĉizaĵoj, 300 000 moneroj kaj medaloj. Tiu kultura trezoro akumulita en la daŭro de kvin jarcentoj konsistigas unu el la plej gravaj bibliotekoj en la mondo. Temas pri la privata papa



Rezulto de preseraro

Inaŭgurinte mian interretan paĝon www.gmverda.com.br, mi devis komenci prepari pli da tekstoj por ĝiaj partoj lingva kaj beletra.



www.gmverda.com.br



www.gmverda.com.br - beletra parto



www.gmverda.com.br - lingva parto

Mi amoplene okupiĝas pri la beletra, kaj mi tien inkludis mian poemon *134a soneto por Nejma*, kiun laŭdis Marjorie Boulton eble pro la du lastaj versoj cititaj de ŝi (inter rektaj krampoj la dek du antaŭaj):


[La trista sperto de soleco vundas
la koron iam plenan de feliĉo:
ho kiel bele, kiam amoriĉo
tra spacoj papilias kaj hirundas! ...

La ĝojo de la povraj nur sekundas
kaj, eĉ pasanta, restas nur postiĉo:
ni kaptas ĝin, ni kredas ĝin sufiĉo,
sed ĝi dimanĉas, kaj neniam lundas!

La vivon trapenetas agonioj,
kiujn ne sekvas morto, sed simptomoj
de larĝa morto, ŝiraj kiel krioj,

sed estas saldo post amorpogromoj,
ĉar amoveno nin estigas dioj,
kaj amoperdo nin refaras homoj!...

Tiu poemo, verkita en la 21a de aprilo 1985 kaj eldonita de Gersi Alfredo Bays (*La libro de adoro*, p. 63. Chapecó:



Fonto, 1985) memorigis min pri alia soneto (Arĉoj, p. 100. La Laguna: Stafeto, 1967), kies du tercetoj estas citataj de William Auld en unu el liaj libroj (Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto. Saarbrücken: Iltis, 1979), en kiu la vosto de komento transformiĝas en vorton de kometo.

Tie li skribis en la paĝo 98 (inter rektaj krampoj la ok antaŭaj versoj):

La sugestio de lia lingvaĵo jam randas la neeblecon ĝin traduki (pri kiu ni multe aŭdas, sed malofte vere renkontas). Kaj tio ŝuldiĝas al lia kuraĝa fido pri la efektiva semantika enhavo de niaj lingvaj elementoj, kiuj sub lia plumo kvazaŭ ekprenas propran vivon kaj ekflugas. Tio estas adekvata al la potenco de lia vizio en tiuj cikloj, kie liaj tropoj foje forlasas la limojn de la prudento kaj soras propraimpete:

[Sen fuĝi de ĉi tiu, mi kreos mian teron,
kaj metos ĉion tie kaj murdos ĉion, kio
nigrigas mian tagon kaj lumas la vesperon
kaj min priŝtelas ĉiam de la malmulta mio:

lum' kaj tenebro, samaj en tim' kaj energio,
ĉar vidi arbon lume, kaj ombre nur desperon
trudas al ni konstante, en turnoj de nenio,
kapablaj por mezuri destinon kaj ĥimeron...]
Mi volas maron nudan de plaĝo, bark', insulo:
la nuran premangoron de vento kaj nebulo
sen kajo por eliri kaj varfo por alveni ...

La mar' de vivo: suno en pruo sen gvidmapo,
kun vorto de komento remanta al fora drapo,
? kie la semo putras en la dezir' poleni!

Libron en la mano, mi ne tuj remetis ĝin sur la etaĝeron,
sed distre komencis foliumi ĝiajn paĝojn, kiuj fluigas dolĉan
mielon sub miaj okuloj, sed mia participomanio perverse
puŝis ilin dufoje al eraroj inter la relego de plej multaj aliaj
senpekaj paĝoj.

La unua misglito trovita aperas en la paĝo 83, kiu citas parton de poemo de Dinwoodie, unu el la kunaŭtoroj de Kvaropo. Auld tie skribas:

Persona malfeliĉo de Dinwoodie estis, ke li kaj lia amata edzino ne sukcesis naski infanon; kaj el tiu privata tragedio li kreis ankaŭ potencajn versojn:

El mia kor' formortis la agito:
tenere fingron el manet' mi tiris,
kaj turnis min al la soleca lito,
el kiu nur en sonĝo mi eliris
. Ĉar nur en sonĝopovo labirinta
etulon kontraŭ noktdanĝer' mi gardis;
nur sonĝe la vizaĝon mi rigardis,
vizaĝon de l' infan' neniam ekzistinta.

Unue laŭdi: la tri sinsekvaj rimoj en kor for mor estas ondoj de tia agito ...

Kaj nun mispaŝis Dinwoodie en la lasta citita vorto: ekzistinta. La kaŭzo de lia eraro estas ĉi tie kaj ordinare la malĝusta koncepto, ke participo estas ia verboformo, kiu indikas la tempon pasintan, estantan kaj venontan kiel ĉiu alia verboformo: ekzistanta estus la ĝusta participo. Sekve de tio, li imagis, ke tie li esprimis tion, kion klare esprimus adjektiva frazo:

nur sonĝe la vizaĝon mi rigardis,
vizaĝon de l' infan', kiu neniam ekzistis.

Ni povus eĉ pensi pri iela tiranio de la rimo: estis al li necesa rimo en -inta! ... Tio tamen neniel pravigus rektan sencan eraron, ĉar tie estas vere dirata io tute absurda en la kunteksto de la poemo:

nur sonĝe la vizaĝon mi rigardis,
vizaĝon de l' infan' kiu ĝis nun ekzistas.

Mi bazas min en la ideo, ke Esperanto estas lingvo absolute kohera, kies precipa regulo esceptas nenion: kio validas por unu, tio validas por ĉiu ... Mi do pruvos mian kritikon per ordinara analogio, kiu funkcias en ĉiuj lingvoj de la mondo, dum infanoj lernas la aŭdatan libron sen ia ĝia instruo, sed en Esperanto ĉiam pro ĝia reguleco. Mi ekzemplas per mia tiam trijara Viktor, kaj nun post du monatoj kvarjara, kiu diris al la patrino, kiu demandis ion de li:

Eu sabo (mi scias).

Evidente, ĝis tiu tempo ne estis konata de li la neregula formo eu sei [eŭ seĵ]. Li rezonis tre simple: se bater (bati) faras eu bato (mi batas), saber (scii) faras eu sabo (mi scias) ... Mi aŭdis kaj aplaŭdis, sed ne korektis, ĉar li ne eraris: legitime li uzis formon, kiu ekzistas en la sistemo, kiu estas lingvo en la menso, sed ne en ĝia normo, kiu estas lingvo en la buŝo (ĝis la fino de la 15a jarcento la portugala havis pli ol cent anomaliajn verbojn, kiujn la tiamaj infanoj reĝustigis krom



la nunaj solaj dek sep).

Kaj nun al la antaŭaj reloj.

Analogio instruas nin: se vivinta estas homo post la vivo, sekve ne plu vivanta kaj do mortinta, ekzistinta estas homo post sia ekzisto, sekve ne plu ekzistanta ... Krome, se neniam mortinta egalas al plu vivanta, neniam ekzistinta egalas al plu ekzistanta, Dinwoodie ne diris tion, kion li pensis, kaj tre verŝajne nekonscie li diris tion, kion li sopiris: tiranio de tragedio

...

Verŝajne Dinwoodie kabeis pro la participoj ...

La dua misglito trovita aperas en la paĝo 89, kiam William Auld komencas sian studon pri la arto de Marjorie Boulton. Ĝi estas la dua en la libro, sed la unua, kiun mi trovis. Tie li skribas:

Unuavice imponas tutsimple la volumeno de ŝia produktado; efektive, ŝi estis, precipe dum la kvindekaj jaroj, versmaŝino; kaj se kelkfoje ŝi kapablis eldoni malpli sukcesan poemon, tamen la kvantego de la vere sukcesintaj verkoj estas grandega.

Mi ne longe diskutos ĉi tiun partupon, sed nur diros, ke sukcesinta estas io post la sukceso, kaj post la sukceso venas ignoro kaj forgeso: *sukcesanta* estus la ĝusta participo! Kaj denove la eraro devenas de la sama misinterpreto de la participoj, kaj Auld imagis al si, ke tie li esprimis tion, kion klare esprimus adjektiva frazo:

... la kvantego de verkoj, kiuj vere sukcesis, estas grandega.

Kaj mi ripetas, ke ne kulpas tiuj multaj, kiuj miselektas la participojn, favorante la estintan formon, kiam pli ĝusta estus la estanta, ĉar kulpas la manko de bona instruo pro manko de bonaj reguloj.

Tiujn mi donas ĉi-sekve, kaj bonvolu pardoni mian modestecon:

-anta: dum iu aŭ io -as / dum iu aŭ io -is / dum iu aŭ io -os.

-ata: dum iun aŭ ion -as / dum iun aŭ ion -is / dum iun aŭ ion os.

-inta: post ol iu aŭ io -as / post ol iu aŭ io -is / post ol iu aŭ io -os.

-ita: post ol iun aŭ ion -as / post ol iun aŭ ion -is / post ol iun aŭ ion -os.

-onta: antaŭ ol iu aŭ io -as / antaŭ ol iu aŭ io -is / antaŭ ol iu aŭ io -os.

-ota: antaŭ ol iun aŭ ion -as / antaŭ ol iun aŭ ion -is / antaŭ ol iun aŭ ion -os.

Aŭ eĉ pli simple, ĉar tie ni vidas, ke la rolantoj (ies) diverĝas:

-is: antaŭ la parolo (vi faris: antaŭ ies parolo)

-inta / -ita: post la fakto (farinta / farita: post ies faro).


Bonan digeston aŭ afablan konteston, kara geleganto!

Geraldo MATTOS

Aperis du noveloj de la afrika aŭtoro Jean Codjo:



La paŝo senelirejen: La unua verko de Jean Codjo, kiu rakontas la unuan kontakton de sia vilaĝo kun la okcidentaj kulturigontoj ... Neteoria trakto, tamen tre inspira!



Dialogo inter surduloj: Dua verko de la benina aŭtoro, pri la malfacileco de komunikado inter kulturoj. Civilizita nigra blankulo prelegas, sub la baobabo, al siaj samtribanoj. Ili aŭskultas sed ne aŭdas ...

Prezo: po 6 eŭroj + afranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via kutima vendisto.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

anoncetoj

Vizitu **Iperity**, la virtualan Esperanto-vilaĝon, kie pli ol 750 Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn fi lmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iperity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por fami-liaj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplo. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Natu-rista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj ver-koj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de la verkoj de Jorge Camacho aŭ de Sikosek? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo*? Ĉio tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

27 EUR

30 USD

aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

4 numeroj jare + La Krom

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
lk@free.fr

Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998
Formato A4, 16 paĝoj

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo:
www.komencanto.narod.ru

Poŝta adreso:
KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg,
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.
Abonu ĉe UEA aŭ
ĉe via landa peranto

Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + aŭfranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be